

## ILERA

Estas tute nature, ke Esperanto ne evitis radioamatoran sporton. Radioamatoroj el la tuta mondo unuigas en la organizaĵo ILERA - Internacia Ligo de Esperantistaj RadioAmatoroj. La membroj de ILERA regule laboras el la zono de mallongaj ondoj kaj faras kontaktojn per radiofonio kie ili uzas Esperanton. Tíamaniere ili propagas la ideon de internacia lingvo, interkomprenon de diversaj nadoj kaj interkomprenon de vasta publiko.

ILERA havas kelkajn centojn da membroj el multaj diversaj landoj. Tre populara estas Esperanto en Sovetunio, kie ĝi estas divastigita inter radioamatora junularo. Tre populara en Sovetunio estas bela lernolibro, kiu nomiĝas "Esperanto por radioamatoroj" de aŭtoro UW 9 YE, s-ano JASKOV el Barnaul, Siberio.

Internacia Ligo de Esperantistaj RadioAmatoroj estis fondita en la jaro 1970 dum 55. kongreso de UEA en Vieno. La unuan fondan kunvenon partoprenis 14 esperantistoj radioamatoroj el 7 landoj. La idea fondinto de ILERA estis Aŭstria esperantisto radioamatoro Rudi Bartosch, OE 3 RU. S-ano Rudi Bartosch mortis en la jaro 1973 sed lia ideo disvastiĝas inter radioamatoroj kaj esperantistoj.

En la jaro 1977 fariĝis ILERA faka grupo de UEA kaj ĝis hodiaŭ havas pli ol 300 membrojn el ĉirkaŭ 50. landoj de la tuta mondo.

Ĉiujare en novembro ILERA organizas mondan radioamatoran konkurson sur mallongaj ondoj, kiu daŭras 48 horojn kaj dum kiu oni uzas Esperanton. Partoprenas stacioj el ĉiuj partoj de la mondo. Jam multajn jarojn oni aranĝas regulajn naciajn kaj internaciajn t.n. "kunvenojn en etero" dum kiuj oni uzas Esperanton. La ideo de tiuj ĉi kunvenoj estas konvinki vastajn vicojn de radioamatoroj, ke artefarita lingvo Esperanto estas kapabla por praktika komunikado kaj ke Esperanto estas lingvo per kiu oni povas facile solvi nunajn lingvajn problemojn inter unuopaj nacioj. Tiun ĉi realan fakton dokumentas jam tio, ke

Esperanto post pli ol 90 jaroj de sia ekzistado fariĝas pli kaj pli multe uzata lingvo, kaj nome ne nur por tradukoj de klasika kaj teknika literaturo, sed ankaŭ en praktika internacia kontakto.

LS/BIZ